

Kaj ŝi rakontis al la fratino laŭeble ĉiujn ĉi strangajn Aventurojn, kiujn vi ĵus tralegis.

Kiam ŝi finis la rakonton, la fratino kisis ŝin, dirante:—

“Jen tre kurioza sonĝo certege, Anjo. Sed jam malfruiĝas; vi do kuru en la domon por la temanĝo.”

Alicio tuj levis sin kaj rajte pensis—dum ŝi kuras—kian mirindan sonĝon ŝi sonĝis!

---

Sed la fratino ankoraŭ sidis sur la deklivo, apogante la kapon per la mano, kaj rigardante la sunsubiron. Ŝi komencis pripensi la fratineton kaj ĉiujn ŝiajn aventurojn, ĝis ankaŭ ŝi falis en revon.

Jen ŝia revo:—

Unue pri Alicio mem ŝi revis. En ŝia fantazio denove la manetoj de Alicio kunligiĝis sur ŝiaj genuoj, denove tiuj klarbluaj okuloj de Alicio rigardas supren en ŝiajn. Ŝi kvazaŭ aŭdis la verajn voĉtonojn, kvazaŭ vidis tiun nur-Alician kapskuon (por postenigi la vageman bukilon, kiu ĉiam malgraŭ ĉio volas fali antaŭ la okuloj); kaj dum ŝi aŭskultas—aŭ ŝajnas aŭskulti—la tuta ĉirkaŭaĵo fariĝis plene posedata de tiuj strangaj sonĝvivaĵoj.

Jen la longa herbaĵo murmuris ĉe ŝiaj piedoj ĉar la Blanka Kuniklo preterpasas—jen la timi-

gita Muso plaŭde naĝas tra la tuta akvo—Jen ŝi ekaŭdis la tintadon de la Martleporo kun siaj kuroj, prenante la neniam finiĝantan manĝaĵon, altvoĉajn kriojn de la Damo ordonante malfeliĉajn gastojn for, for al la pordo. Ankaŭ, jen la porkinfano ternadante dukinajn genuoj, dum frakasiĝas sur la teleroj kaj pladoj. Denove pleniĝis tiu stranga krio de la Grifo, tiu de la l' Lacerta grifelo, la sufokaj blekoj, la premataj kobajoj; kaj malproksimaj plorĝemoj de la Falsa Kelonio.

Tre longe ŝi sidadis, kun okuloj preskaŭ kredis ke ŝi mem vagas en la Mirlando, kvankam ŝi bone konsciis ke ŝi malfermos la okulojn, la fantazio kaj ĉio refariĝos ordinara.

Se ŝi malfermos la okulojn, jam ne la herbon Blanka Kuniklo, sed nur la akvoplaŭdojn kaŭzos ne la Muso, sed la liĝantaj kanoj; la tintadantaj tetaĵoj, la ŝafsonoriloj; tuj mortos la altvoĉa la furioza Damo, renaskiĝante la ŝafpaŝtisto; la infana ternado, la strangaj bruoj fariĝos—nur konfuzaj la farmkorto; kaj, anstataŭ la prode la Falsa Kelonio, ŝi aŭdos de la blekadon de la bovinoj.